# EKO

Esperiga Komuniko

Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado

## Enhavo


- AMO 56 – ni, universalaj?
- AMO 55 – ni, hom-medie konsciaj?
- Greziljono havas riĉan oferton
- Denaskuloj atentindaj



EKO 2019-08 sendita el Budapeŝto la 21an de majo.

Redakcio: Stefan MacGill, Mirejo Grosjean.


*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol mil ricevantoj.*


Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA


## AMO 56 en Pollando – kiom universalaj ni estas?

Ene de semajno okazos la 56a Seminario pri Aktivula Maturigo (AMO). Tio okazos en la urbeto Złotoryja, proksima al Wroclaw. La seminario revenas al provoka artikolo en revuo *Esperanto* de decembro 2018, p. 256. Tiu artikolo (aldonita kiel alkroĉaĵo) klare indikis per dek indicoj, kiom ege maluniversala estas UEA. Demando esplorota en la seminario: kiom granda estas la diferenco inter la (ne)universaleco de UEA, kompare al tiu de la tuta parolkomunumo.

En la diskutaj partoj de la seminario, jen kelkaj demandoj por sproni la opiniojn:

Kiujn spertojn vi havas pri internaciaj kontaktoj?
Kiom internacia estas la Eo-komunumo?
Kiom da informoj vi havas pri UEA, kaj kiom da kontakto vo havas kun ĝi?
Kiom internacia estas la mondo de UEA?
Ĉu esperantisto laŭ morala devigo devas iĝi spertulo pri interkulturo?
De kie akiri pli bonajn interkulturajn kapablojn?
Kiel la nova kotizsistemo de UEA povos signife altigi la tutmondecon de la Asocio?

La Seminario okazos paralele kun la jam tradicia kantfestivalo/konkurso kaj unutaga simpozio en la Universitato de Wroclaw, en kiu la vicprezidanto de UEA elpaŝos kun la temo: “Junaĝo kaj la Tria Aĝo en la Eo-movado”.

## AMO 55 – kiel organizi kongresojn amikajn al la hom-medio?




AMO 55 okazis meze de aprilo en Danang, Vjet-namio, kadre de la 9a Azia-Oceania Kongreso. La seminario havis temon “Kiel igi Esperanto-aranĝojn amikaj al medio?” Partoprenintoj ricevis demandilon por plenskribi. Ni alkroĉas ĵus ricevitan lumbildan materialon por tiu seminario – eventuale la unua aŭ dua por trakti ekskluzive ekologian temaron.

## La feriotempa oferto de Kulturcentro Greziljono

La Esperanto-Kulturdomo en kastelo Greziljono (Francio) invitas vin al siaj someraj kursoj kaj aktivaĵoj, dum 7 ĝis 10 tagoj, en julio kaj aŭgusto

de lundo 8a ĝis ĵaŭdo **18**a de **julio**: Maratona kurso kaj interŝanĝoj

- Dennis Keefe (Usono, Ĉinujo): **KUKO**, nova Kurso Unesko-Kuriero
- Marion Quenut (Okcitanujo): Esperanto-kurso « **Ni kuneku !** » por komencintoj kaj progresantoj
  - Interŝanĝoj de scioj kaj faroj en la franca lingvo
  - Caroline Mauboussin: Libro-bindado
- Vidu la detalojn en gresillon.org/s2, aliĝo en gresillon.org/aligho

de mardo **6**a ĝis vendredo **16**a de aŭgusto: Infanoj, familioj, dancoj

- Dennis Keefe (Usono, Ĉinujo) : Nova kurso pri la filmoj de Ĉarli Ĉaplin (*Charlie Chaplin*)
- Jean-Luc Kristos : Ludu ni por paroli iomete, multe, pasie !
  - aktivaĵoj por la infanoj kun Nicky, Larissa, Anastasia, Alain, Bert
  - tradiciaj popoldancoj kun Françoise
- Vidu la detalojn en gresillon.org/s4, aliĝo en gresillon.org/aligho

## Lu Wunsch-Rolshoven pri la rolo de denaskuloj

https://eo.wikipedia.org/wiki/Denaskaj_Esperanto-parolantoj#Literaturo_pri_denaskuloj_(inkl._de_scienca)

En tiu retejo mi kolektis literaturon pri Esperanto-denaskuloj, ĉefe sciencajn artikolojn. Eble iu ŝatos aldoni ion (aŭ informi min, por ke mi aldonu).

Ŝajnas al mi, ke la ekzisto de milo da denaskuloj estas grava kriterio por multaj lingvistoj ne parolantaj Esperanton, kiam ili priskribas Esperanton. Ofte la klasifiko estas iom simpla: Lingvo sen denaskuloj estas morta, kun (grandeta nombro de) denaskuloj ĝi estas vivanta lingvo. Certe ekzistas multaj argumentoj por aserti, ke en la kazo de la planita lingvo Esperanto jam sen konsidero de la denaskuloj indas konstati, ke ĝi estas vivanta lingvo. Tamen laŭ la spertoj de multaj homoj la argumentado por Esperanto kiel vivanta lingvo iĝas konsiderinde pli facila, se oni mencias la denaskulojn.

Sekve mi instigas, ke ĉe la prezento de Esperanto ni eksplicite menciu ankaŭ la ekziston de la Esperanto-denaskularo. Temas laŭ mi pri unu el la ecoj de Esperanto kaj de ties lingvo-komunumo, kiun ni ne nur flanke prezentu.

Kp. https://eo.wikipedia.org/wiki/Denaskaj_Esperanto-parolantoj#Esperanto-denaskularo_kaj_Esperanto_kiel_%22vivanta_lingvo%22
kaj sekva alineo. Volonte mi legos aliajn argumentojn pri tio.

Vortoj: 535

=====================

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis la fino de 2018. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.